

CDELI ricevis belan laborsalonon

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-840/323, 1979 novembro 15 kaj 17

http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-49-/Radioprelego_840_SRI_323_1979_11_15_17_CDELI_ricevis_belan_laborsalonon.mp3

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia sinjoro Claude Gacond.

Plurfoje ni jam raportis pri la interlingvistika aktiveco de CDELI, "Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale" aŭ en esperanto : "Centre de Dokumantado kaj Studo pri Internacia Lingvo" en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Kaj dum tiu ĉi somero partoprenantoj de la Universala Kongreso ĝuste ekskursis al La Chaux-de-Fonds por interalie viziti la novan salonon de CDELI. Ne tute preta ĝi estis.

Ekde sia naskiĝo en 1967a ĝis nun la kunlaborantoj de CDELI devis plenumi sian aktivecon en loketoj, kiujn la personaro de la biblioteko ne konstante uzis. Unue CDELI havis je sia dispono nehejteblan subtegmentejon. Ĝi poste migris en la ĉambron Edmond Privat kaj en la revuejon, sed nur en la kela trezorejo de la biblioteko ĝi povis kontentige disvolviĝi. Ĉiulunde grupo venas ordigi kaj katalogi la rikoltitan dokumentaron: librojn, revuojn kaj arkivaĵojn. Bibliotekisto konsilas tiun ĉi laboron kaj pretigas la slipojn.

Kiam antaŭ deko da jaroj la gimnazio forlasis la domegon, kie ankaŭ troviĝas la biblioteko, tiam oni povis antaŭvidi etendiĝon de la bibliotekaj servoj. Tiu ĉi disvolviĝa fazo efektiviĝis dum la kvin lastaj jaroj. Unue ekspoziciejo estis kreita en la subtegmentejo. Kaj poste migris teretagen la pruntoservo. Tio permesis pli adekvate instali la administran etaĝon. La legosalono estis grandigita. Babilejo permesas renkontiĝi kaj legi taggazetojn, trinkante kafon. En muzika salono oni povas prunti diskojn kaj sonbendojn. Fine pluraj kulturaj movadoj ricevis laborsalonojn por grupigi siajn arkivojn. Tiel estas por la kamparana muzeo, kiu muntis ĉambron pri la regiona historio. Sociologoj kaj politikistoj ricevis alian ĉambron. Same la sonbendĉasistoj kaj filmamatoroj. Ankaŭ CDELI profitis pri tiu ĉi agado, ricevante belegan salonon apud la lego-ĉambrego, kio faciligas la laboron de la serĉantoj.

Ni hodiaŭ perradie vizitigos al vi la salonon de Centro de dokumentado kaj studo pri lingvo internacia.

Enirante vi tuj rimarkas la portreton de Zamenhof, kaj poste multajn aliajn portretojn. Estas sub la rigardoj de la patroj de diversaj interlingvoj kaj de esperanto-pioniroj, ke la aktivuloj de CDELI plenumas sian laboron.

Meze de la salono la sliparo imponas. Ĝi montriĝis utila instrumento por la serĉantoj kaj ĝi konstante kreskas, registrante la riĉaĵojn de CDELI.

Tabloj permesas al deko da personoj labori kaj kunsidi.

Bretaroj vicigas librojn kaj dokumentajn skatolojn. Kiam la libroj estas katalogitaj, ilin oni konservas en kompaktaĵoj en la subtera etaĝo de la biblioteko. Fakte en la CDELI-salono troviĝas nur materialo prizorgata: revuoj daŭre aperantaj aŭ kies kolektoj ne estas kompletaj, libroj, broŝuroj kaj dokumentoj katalogotaj.

Kiam oni estas ekzameninta la sliparon, kie ne nur la aŭtoroj kaj titoloj de la verkoj estas indikitaj, sed ankaŭ ilia enhavo estas analizita, oni emas pli atente rigardi la portretojn: grandajn fotojn kaj karikaturon tre belajn.

Apud la enirejo la filozofoj Descartes kaj Leibniz ĉirkaŭas la gramatikiston Komenski, rememorigante, ke ili estas la patroj de interlingvistiko.

Sekvas Johann-Martin Schleyer, la aŭtoro de Volapük kaj August Kerkhoffs la direktoro de la Volapüka Akademio. Tiu volapükisto proponis reformon de la Schleyera lingvo, kiu kondukis al la naturalismo tra la projekto Idiom neutral de Rosenberger, posteulo de Kerkhoffs. Sekvas Edgar von Wahl, tiu eksterordinara estono, kiu pioniris efike en la movadoj Volapüka, Esperanta, Neŭtrala, antaŭ ol proponi la projekton Occidental, kiam Ligo de Nacioj diskutis pri Esperanto.

Louis Couturat atestas pri alia tendenco. Li fakte publikigis fundamentan eseon pri la Universalaj Lingvoj kaj ofte kritikis pli kaj pli severe esperanton. Tra la Delegacio li sekrete trudis sian projekton Ido, iel devigante la advokaton mem de esperanto, Louis De Beaufront, patroni tiun ĉi novan lingvon. Tiuj intrigoj ne sukcesis, sed lasis profundan spuron en la interlingvistika historio.

Tute, alian personecon havis sinjorino Morris, la usona miliardulino, kiu malavare subvenciis la laborojn de IALA kaj la eldonadon de fundamentaj verkoj, kiel la Bibliografio de Planlingvoj de Petro Stojan kaj la Originalan Verkaron de Zamenhof. Ŝia beleco kaj afableco altiras al si la atenton de la vizitantoj de CDELI.

Kun ŝi, kiu estis fakte esperantistino, komenciĝas vera galerio da esperanto-pioniroj. Tre belaj portretoj de Julio Baghy kaj Pierre Bovet faritaj dum la ĝeneva Universala Kongreso en 1925a ŝajnas vigle konversacii, verŝajne pri la literatura kaj pedagogia valoro de esperanto.

Pli popola artisto pentris sufiĉe interesan portreton de Zamenhof. Post tiu iom rigida sed sufiĉe altira kolorita bildo sekvas tre interesaj karikaturaj faritaj de Petroviĉ, karikaturisto de Ligo de Nacioj. Ankaŭ okaze de la Universala Kongreso en 1925 tiuj ĉi pentraĵoj estis realigitaj.

Edmond Privat montriĝas kiel impona ambasadoro. Lia amiko Hans Jakob nelacigeble sekretarias por UEA, dum Robert Kreutz, lia direktoro fiere promoenigas sian dikan ventron. Won Kenn proponas al la okcidentanoj pere de majstraj tradukoj esperantigojn el ĉinaj ĉefverkoj. Li fakte simbolas la tradukan rolon de la zamenhofa lingvo.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond prezentis al vi la novan salonon CDELI en la Urba Biblioteko, La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo!